

ESPERANTOLEHTI

Esperanta Finnlando ♦ Esperantobladet ♦ marraskuu ♦ novembro 4/2025



- ♦ Adventtiaika ja toivo – Adventotempo kaj espero, p. 3–4
- ♦ Vintraj Tagoj kaj jarkunveno 7.–8.3.2026, p. 6
- Rememoroj pri Saliko – Muisteluja Raidasta, p. 12–14

ESPERANTOLEHTI • ESPERANTA FINNLANDO • ESPERANTOBLADET

Julkaisija/Utgivare/Eldonanto: Esperanto-Asocio de Finnlando – Suomen Esperantoliitto ry

Suomen Esperantoliitto ry:n

äänenkannattaja ja tiedotuslehti.

Organ för Esperantoförbundet i Finland.

Organo de Esperanto-Asocio de Finnlando.

Tekstit ja kuvat lainattavissa Suomen Esperantoliiton (EAF) tai tekijän luvalla. Lähde mainittava. För att använda verket behövs tillstånd av Esperantoförbundet (EAF) eller av upphovspersonen. Källan ska anges.

Tekstojn kaj bildojn oni rajtas reuzi nur kun permeso de la redakcio (EAF) aŭ de la aŭtoro kaj kun indiko de la fonto.

Kansikuva/Pärmfoto/Kovrilbildo: Tri bil-
doj el Salo, kie ni havos Vintrajn Tagojn en
2026. *Kuvia Salosta, jossa pidetään Talvipäi-
vät v. 2026. Nästa årsmöte och dagar aran-
geras i Salo.* Fotoj: Mary Tähtinen.

SISÄLTÖ/INNEHÅLL/ENHAVO:

Puheenjohtajalta – De la prezidanto . . .	3–4
Liitto tiedottaa, EAF informas	5
Vintraj Tagoj, Talvipäivät Salo	6
Vuosikokouskutsu, alvoko	6
Eventoj de EAF 2026	7
Jäsenjärjestöiltä, de membrosocietoj . .	7–9
Fondumo Esperanto-säätiö (FES) julistaa haettavaksi apurahoja	9
Pri Aŭtunaj Tagoj en Tampere.	10
Lingva Angulo de Jouko Lindstedt. . . .	11
Rememoroj pri Saliko	12–14
Liiton hallitus ja jäsenjärjestöt	15
La filmo "Patrinoj – Äidit"	16

Toimitusryhmä/Redaktionsgrupp/

Redakta grupo:

eaf@esperanto.fi

Vastaava toimittaja/Ansvarig redaktör/

Respondeca redaktoro: Juha Metsäkalas

Toimitussihteeri/Redaktionssekreterare/

Redakta sekretario: Tiina Oittinen

Taitto/Layout/Enpaĝigo: Maj-Lis Krouvi,

maj-lis@maisnapaja.info

www.esperanto.fi

www.facebook.com/Finnlando

Liity Suomen Esperantoliiton jäseneksi.

Henkilöjäsenen jäsenmaksu vuonna 2025 on 25 €/vuosi ja siihen sisältyy Esperantolehti. Vuosikokous maaliskuussa määrittää vuoden 2026 jäsenmaksun. Voit liittyä jäseneksi myös jonkin paikallisen jäsenyhdistyksen kautta, ks tarkemmin sivu 15. Jäsenyhdistysten jäsenet ovat automaattisesti myös liiton jäseniä.

Uudet jäsenet saavat liittymislahjaksi kirjan *Tohtori Zamenhof ja kansainvälinen kieli.*

Ota yhteyttä liiton sihteerin sähköpostin *eaf@esperanto.fi* kautta niin saat linkin liittymislomakkeelle ja lisätietoja.

Fråga om medlemskap i Esperantoförbundet genom eaf@esperanto.fi.

Demandu pri membreco en EAF skribante al la retpoŝta adreso *eaf@esperanto.fi*.

Liiton hallitus ja jäsenjärjestöt: sivu 15

Estraro de EAF kaj membrosocietoj:

paĝo 15

Esperantoförbundets styrelse och medlemsföreningar: sidan 15

Ilmestyy neljä kertaa vuodessa paperi&

PDF-muodossa, lisäksi vuosittain PDF-lisäjulkaisu.

Utkommer fyra gånger i året i pappers- och PDF-format plus ett tillägg endast i PDF-format.

Eldonota kvarfoje jare en papera kaj en PDF-a formoj plus suplemento nur en PDF-a formo.

Esperantolehti 1/2026 ilmestyy helmikuussa, utkommer i februari, aperas en februaro.

Tilaushinta v. 2026 ilman jäsenyyttä:

28 €/vuosi, tilaukset ja ilmoitushinnat:

 *eaf@esperanto.fi*

Prenumering utan medlemskap och annonspriser.

Abonprezo por ne-membroj kaj anoncoprezoj.

Adventtiaika ja toivo



Marraskuun pimeys tekee ihmisestä odottajan. Valon vähetessä katse kääntyy kohti kynttilöitä, tähtiä ja joulun lupauksia. Joulun odotus, adventti, tulee latinan sanasta ”adventus”, saapuminen, ja joulukalenteri, adventtikalenteri, on tämän odotuksella täytetyn ajan symboli. Jokainen avattu luukku paljastaa paitsi suklaan tai yllätyksen, myös yhden askelen lisää kohti juhla-aikaa, yhden hetken lisää toivoa.

Kulunut vuosi on ollut monella tavalla odotuksen ja muutoksen aikaa. Olemme uudistaneet liittomme sääntöjä ja valmistelee ensi vuonna käyttöön tulevaa uutta jäsenmaksujen keräystapaa, jonka toivomme palvelevan kaikkia jäseniämme entistä paremmin.

Maailmanlaajuisesti vuosi on ollut erittäin raskas. Gazan sota paljasti, kuinka kaukana ihmiskunta yhä on rauhan ihanteesta, jota Esperanto-liike on yli sadan vuoden ajan kantanut. Vaikka Gazaan saatiin ainakin jonkinlainen rauha, Venäjän laiton hyökkäyssoita Ukrainaa vastaan jatkuu. Meidän on oltava selvästi Ukrainan puolella – kansan, joka puolustaa vapauttaan ja oikeuttaan elää rauhassa. Rauhaa kaivataan myös muualle maailmaan, mm. sisällissodan runtelemaan Sudanisiin. Rauhaa ei kuitenkaan voi rakentaa

väkivallan tai sillä hankittujen todellisten tai kuvitellujen saavutusten varaan, ja juuri siksi meidän on uskallettava sanoa, mikä on oikein ja mikä väärin.

Kotimaassamme keskustelu maahanmuutosta ja työvoimapulasta on jatkunut. Esperantoliitto kannustaa avarakatseisuuteen: tarvitsemme kaikkia, uusia tulijoita, uusia ystäviä ja työntekijöitä pitämään yllä hyvinvointia. Tarvitsemme kaikkia, jotka haluavat rakentaa yhteiskuntaa, jossa jokainen voi kuokistaa.

Kun nyt lähestymme joulua ja uutta vuotta, on hyvä hetki pysähtyä: mitä me odotamme? Toivon, että odotamme enemmän kuin vain vapaita ja lahjoja. Olkoon joulun ja uuden vuoden odotus toivoa paremmasta. Toivoa ihmisten välisestä yhteydestä, joka ylittäisi kielet ja rajat. Sitä valoa, jota ei sammuteta, vaikka maailma ympärillä horjuisi.

Hyvää joulua ja toivorikasta uutta vuotta kaikille lukijoille – *feliĉan julon kaj espero-plenan novan jaron!* Jatkakaamme yhdessä työtä sen puolesta, että toivo, *espero*, ei olisi vain sana, vaan todellisuutta mahdollisimman monelle.

Juha Metsäkallas

Adventotempo kaj espero

Adaptite el la finna originalo



La mallumo de novembro faras el la homo atendanton. Kiam la lumo malpliĝas, la rigardo turniĝas al kandeloj, steloj kaj al la promesoj de julo. La atendado de julo, *advento*, devenas de la latina vorto “adventus”, alveno, kaj la jula, adventa kalendaro estas simbolo de tiu tempo plena je atendo. Ĉiu malfermita fenestreto montras ne nur pecon da ĉokolado aŭ etan surprizon, sed ankaŭ unu paŝon pli proksimen al la festotempo – unu momenton pli da espero.

La pasinta jaro estis en multaj rilatoj tempo de atendado kaj ŝanĝiĝo. Ni ĝisdatigis la statuton de nia asocio kaj preparis novan sistemon por kolekti membro-kotizojn, kiu ekvalidos venontjare kaj, ni esperas, servos al niaj membroj eĉ pli bone.

Tutmonde la jaro estis tre peza. La milito en Gazao montris, kiom malproksime la homaro ankoraŭ estas de la idealo de paco, kiun la Esperanta movado jam pli ol jarcenton portas. Kvankam en Gazao fine aperis almenaŭ iu formo de paco, la kontraŭleĝa invado de Rusio kontraŭ Ukrainio daŭras. Ni devas esti klare ĉe la flanko de Ukrainio – de popolo, kiu defendas sian liberecon kaj sian rajton vivi en paco. Oni sopiras pacon ankaŭ al aliaj partoj de la mondo, interalie al Suda-

no, kiun disŝiras la interna milito. Sed veran pacon oni ne povas konstrui sur perforto nek sur atingoj akiritaj per ĝi – realaj aŭ imagitaj. Tial ni devas kuraĝe diri, kio estas ĝusta kaj kio malĝusta.

En nia propra lando la diskuto pri enmigrado kaj manko de laborforto daŭras. La Esperanto-Asocio de Finnlando instigas al vastaspiriteco: ni bezonas ĉiujn – novajn enmigrantojn, novajn amikojn kaj laborantojn por subteni nian bonfarton. Ni bezonas ĉiujn, kiuj volas konstrui socion, en kiu ĉiu povas flori.

Nun kiam ni proksimiĝas al julo kaj la nova jaro, estas bona momento halteti: kion ni atendas? Mi esperas, ke ni atendas pli ol nur feriojn kaj donacojn. Ke la atendado de julo kaj la nova jaro egalu esperon pri io pli bona – esperon pri interhoma kompreno, kiu transpasas lingvojn kaj landlimojn. Esperon pri tiu lumo, kiun oni ne povas estingi, eĉ se la mondo ĉirkaŭe ŝanceliĝas.

Feliĉan julon kaj esperoplenan novan jaron al ĉiuj legantoj! Ni kune daŭrigu la laboron por tio, ke espero ne estu nur vorto, sed realaĵo por kiel eble plej multaj.

Juha Metsäkallas

EAF informas – Liitto tiedottaa

Esperantolehti – Esperantobladet – Esperanta Finnlando numero 4/2025

Post la dua PDF-forma suplemento, Esperantolehti 4/2025 aperas denove en la kutima formo: kiel papera kaj PDF. EAF sendas la gazeton al ĉiuj membro-abonantoj, kiuj havas retpoŝton. Niaj kunlaborantoj en Finnlando kaj eksterlande ricevas ĝin rete. Volonte sendu al ni komentojn.

Tämä numero 4/2025 ilmestyy jälleen sekä painettuna että PDF-muodossa. Lokakuussa lähetimme Esperantolehden tämänvuotisen värillisen PDF-lisäjäulkaisun kaikille tilaajille, joilla on sähköposti. Lisäksi sen saivat yhteistyökumppanit niin Suomessa kuin ulkomailla. Liiton päätöksistä ilmoitamme paperilehdessä sekä jäsenistölle lisäksi sähköpostitse. Kommentit, mielipiteet ja jutut osoitteeseen eaf@esperanto.fi.

Esperantolehti surpapere, kiel PDF aŭ ambaŭ; enketo venos

Dum kelkaj jaroj Esperantolehti aperas kaj surpapere kaj kiel PDF. Ambaŭ estas senditaj per la sama kotizo al abonantoj. Kelkaj abonantoj tamen ne havas retpoŝtan adreson kaj tial ricevas nur la paperan version. Paperajn versiojn ricevas aŭ abonas ankaŭ kelkaj bibliotekoj kaj kunlaborantoj en Finnlando. Ni sendos al abonantoj per retpoŝto enketon pri tio, ĉu ili deziras havi kaj la paperan kaj la PDF-forman

gazeton. Ni volonte sendos ambaŭ, sed estus bone scii pri ekzaktaj deziroj de la abonantoj. Vi povas ankaŭ informi vian opinion per telefono aŭ per tekstmesaĝo: la numerojn vi trovas sur la paĝo 15.

Olemme nyt muutaman vuoden ajan tehneet Esperantolehdestä paperilehden lisäksi myös PDF-version, jonka lähetämme sähköposti-osoitteensa ilmoittaneille lehden tilanneille jäsenille. Paperilehteä painatamme noin 150 kappaletta, sitä menee myös joidenkin kirjastojen lukusaleihin Suomessa. Kaikki eivät ole ilmoittaneet sähköpostiosoitettaan, ehkä kaikilla ei edes ole sellaista. Jotkut ovat puolestaan ilmoittaneet, etteivät halua ollenkaan painettua lehteä. Olemme lähettämässä tilaajille sähköpostilla tiedustelun, jossa kysytään haluatko lehden sekä paperisena että PDF-muodossa. Kyselyyn voi osallistua myös soittamalla esim. sihteerialle tai lähettämällä tekstiviestin. Yhteystiedot ovat sivulla 15. Kaikki mahdollisuudet käyvät meille, toivomme vain tietoa siitä, millaisen lehden jäsenemme haluavat.

Ĝuu la legadon kaj surpapere kaj en la reto!

Mukavia lukuhetkiä sekä paperi- että verkko-lehden lukijoille!

*La estraro de Esperanto-Asocio
de Finnlando (EAF)
Suomen Esperantoliiton hallitus*

Vintraj Tagoj kaj jarkunveno – Talvipäivät ja vuosikokous 7.–8.3.2026

Vintraj Tagoj de EAF kun la jarkunveno okazos venontjare en *Salo* komence de marto, dum la semajnfino de 7-a ĝis 8-a de marto 2026. La ĉefa kunvenejo estos hotelo *Original Sokos Hotel Rikala* en la urbocentro. La jarkunveno estos je sabato, vidu la alvokon. Ni pritraktos la jarkunvenajn aferojn laŭ la nova statuto, kiu nun estas akceptita ankaŭ de PRH-registrejo. Membroj ricevos informan retpoŝton pri la nuna statuto (finnlingva).

En la programo estas planita almenaŭ vizi-
to en la elektronika muzeo kaj rondirado en la urbocentro. Detala programo kun aliĝilo aperos en la retejo de EAF kaj en Esperantolehti 1/2026.

Membroj ricevos informojn ankaŭ per retpoŝta membroletero. Nin bonvenigas lo-
kaj esperantistoj, inter ili *Mary Tähtinen*, kiu afable promesis rakonti al ni pri ŝia hejmurbo.

Esperantoliiton seuraavat talvipäivät ja vuosikokous pidetään 7.-8.3.2026 Salossa. Koko-

uspaikkamme on hotelli Original Sokos Hotel Rikala kaupungin keskustassa. Vuosikokous pidetään uusittujen sääntöjen mukaisesti, jotka PRH on nyt hyväksynyt. Jäsenet saavat säännöt tiedoksi sähköpostilla (jos haluat säännöt postitse, ilmoita sihteerille, yhteystiedot s. 15).

Tutustumme kaupunkiin kävelykierroksella ja käymme ainakin Salon elektroniikkamuseossa. Tarkempi ohjelma ilmoittautumislomakkeineen tulee alkuvuodesta verkkosivuillemme ja ilmestyy Esperantolehdessä 1/2026. Jäsenet saavat myös tietoja jäsenkirjeessä sähköpostilla. Saloon meidät toivottaa tervetulleiksi erityisesti Mary Tähtinen, joka myös esittelee meille kotikaupunkiaan.

Bonvenon – Tervetuloa!

*La estraro de Esperanto-Asocio
de Finnlando (EAF)
Suomen Esperantoliiton hallitus*

Alvoko – Kutsu – Kallelse

La laŭstatuta jarkunveno de Esperanto-Asocio de Finnlando okazos sabaton, la 7-an de marto 2026 je la 15:00 horo en Salo, en la kunvenejo de la hotelo *Original Sokos Hotel Rikala*, adreso: *Asemakatu 15*. En la kunveno estos traktataj la laŭstatutaj jarkunvenaj aferoj.

Esperanto-Asocio de Finnlando, Suomen Esperantoliitto ry:n sääntömääräinen vuosikokous pidetään lauantaina 7.3.2026 klo 15.00 alkaen Salossa, paikka: hotelli Original Sokos Hotel Rikalan kokoustiloissa, osoite: Asemakatu 15. Kokouksessa käsitellään liiton sääntömääräiset vuosikokousasiat.

Esperantoförbundet i Finland håller sitt stadgeenliga årsmöte lördagen den 7.3.2026 kl. 15.00 i Salo, i mötesutrymmen av Original Sokos Hotel Rikala, adress: Asemakatu 15. Mötet behandlar de i förbundets stadgar föreskrivna årsmötesärendena.

La estraro – Hallitus – Styrelsen

Eventoj de EAF 2025–2026

Aŭtunaj Tagoj okazis fine de septembro. Alia evento estis en oktobro la prezentado de la filmo *Patrinoj – Āidit* en Helsinki, legu raportetojn pri ambaŭ eventoj sur paĝoj 10 kaj 16. Dum novembro-decembro la mem-brosocietoj kaj aliaj grupoj havos kursojn, renkontiĝojn kaj julajn festetojn kiel kutime. Retaj renkontiĝoj, *Babilado*, okazos laŭ eblecoj; sekvaj estos lige al la filmoprezentado kaj Zamenhof-tago.

Dum la jaro 2026 ni havos en marto Vintrajn Tagojn en Salo kaj en junio Someran kurson en Raisio.

Ni planas ankaŭ venontjare komunan aŭtobusan karavanon al la 111-a Universala Kongreso en Graz, sed sendos unue demandaron retroŝte pri la itinero kaj daŭro de la ebla vojaĝo.

Informojn, demandojn kaj enketojn EAF kaj mem-brosocietoj sendas al membroj tra retroŝto aŭ tra tujmesaĝiloj. Ni ankaŭ bonvenigas viajn proponojn pri aferoj koncerne nian agadon. Ne hezitu kontakti nin per iu ajn maniero, kontaktinformojn de estraranoj kaj de mem-brosocietoj vi trovas sur paĝo 15.

Ĝeneralajn sciojn pri nia agado, celitaj ankaŭ al ne-membroj, oni trovas tra nia retejo www.esperanto.fi.

Viimeisimmät tapahtumamme olivat syyspäivät Tampereella ja elokuvan Patrinoj – Āidit jäsennäytös Helsingissä, molemmista lyhyet raportit, ks. sivut 10 ja 16.

Marras-joulukuussa tapahtumia ovat erilaiset paikalliset kurssit ja tapaamiset, mm. pikkujoulut. Liiton Babilado-verkkotapaamiset ovat seuraavan kerran joulukuussa, jolloin on mahdollista katsoa Patrinoj – Āidit elokuva sekä tava Zamenhof-päivän merkeissä; tiedote tulee sähköpostilla. Talvipäivät ovat Salossa ja kesäkurssi Raisiossa, niistä tulee tietoa myös verkkosivuille. Suunnitteilla on jälleen yhteinen linja-automatka (karavaani) Esperanton maailmankongressiin Itävallan Graziin, mutta siitä haluamme ensin mielipiteitä matkan reitistä ja kestosta. Kaikenlaisia ehdotuksia toimintaamme ja tapahtumiimme liittyen otamme tosi mielellämme vastaan.

Liitto ja jäsenyhdistykset lähettävät jäsen-tiedotteita sähköpostilla ja pikaviestimillä. Yhteyttä voit toki ottaa muullakin tavalla. Liiton hallituksen tiedot samoin kuin jäsenyhdistysten ovat sivulla 15.

Kaikille, myös muille kuin jäsenille, tarkoitettut tiedotteet ja ilmoitukset ovat luettavissa verkkosivuiltamme osoitteessa www.esperanto.fi.

*La estraro de Esperanto-Asocio
de Finnlando (EAF)
Suomen Esperantoliiton hallitus*

Esperantoklubo de Oulu informas

Saluton!

Nia oŭlua grupeto kunvenas la lastan sabaton de ĉiu monato je la 13-a horo en la biblioteko de *Karjasilta*. La lastan kunveneton ĉi-jare ni havos en novembro, en decembro estos

jula paŭzo. Ni kunvenos denove ekde januaro 2026, sed la loko certiĝos nur post la jarŝanĝo.

Bonvolu informi nin pri via partopreno antaŭe; sendu tekstmesaĝon al 040 8329075. Bonvenon!



Eli sama suomeksi:

Oulu-ryhmä kokoontuu joka kuun viimeinen lauantai klo 13 Karjasillan kirjastossa. Tämän vuoden viimeinen kerta on marraskuussa, joulukuussa pidetään joulurauhaa. Tammikuussa

2026 jatketaan, mutta paikka varmistuu vasta vuodenvaihteen jälkeen. Ilmoita tulostasi etukäteen tekstarilla minulle. Tervetulua!

Leila Tiitto

Esperanto-klubo de Helsinki informas

La kafejaj renkontiĝoj de Esperanto-klubo de Helsinki (EKH):

En novembro: renkonto en sabato 29.11.2025

En decembro: renkonto en sabato 13.12.2025

La renkontejoj: kafejo *Robert's Coffee*, adreso *Kampinkuja 2* (Sähkötalo).

Vi estas ĉiuj bonvenaj partopreni en la renkontiĝoj. Pro eblaj ŝanĝoj kaj pro venont-

jaraj renkontiĝoj, sekvu informojn en nia retejo: esperantohelsinki.wordpress.com

Tervetuloa tapaamisiin myös ne, jotka ovat vasta tutustuneet esperantoon. Lisätietoja ensi vuoden tapaamisista ja muusta saa Helsingin Esperantoseuran verkkosivulta esperantohelsinki.wordpress.com

Yhteyssähköposti esperanto@bastu.net

Esperanto-societo Antaŭen informas – Antaŭen tiedottaa

Bonvenon al Tampere kaj al niaj renkontiĝoj! Niaj renkontiĝoj okazos ĵaŭde je 13–15 en *Kulttuuritalo Laikku*, en la ĉambro *Mäkelän kabinetti*, 3-a etaĝo:

En la jaro 2025 ankoraŭ dufoje:

27.11. (elektokunveno) kaj 11.12.

Por viziti kaj por informiĝi pri venontjaraj renkontiĝoj, bonvolu kontaktiĝi kun *Raimo* aŭ kun *Sylvia*.

Tapaamisemme marras-joulukuussa ovat Kulttuuritalo Laikussa, Mäkelän kabinetissa 3. kerros torstaisin klo 13–15 seuraavasti: 27.11.2025 (vaalikokous) ja 11.12.2025.

Ensi vuonna jatkamme, kysy tarkat tapaamispäivät ja ilmoita tulostasi etukäteen Raimolle tai Sylvialle.

raimo.tuisku@saunalahti.fi

sylvia.h@kolumbus.fi, tel: 050 321 4313.

Tervetuloa tapaamiimme!

*Estraro de Antaŭen
ja kaikki antaŭenilaiset*

Esperanto-societo en Turku informas

Niaj kursoj en la en *Civitana Instituto de Aurala* daŭros ĉiun mardon ĝis la 2-a de decembro. La semajnaj renkontoj okazos ĉi-jare ĵaŭde ĝis la 11-a de decembro inter la 17:30 kaj 18:45 en la kafejo *Sirius* de la ĉefbiblioteko de Tur-

ku. La kursoj kaj renkontoj kontinuiĝas en januaro 2026.

Kaj notu precipe ĵaŭdon, la 18-an de decembro: tiam ni havos nian tradician, julan festejon en *Pohjola-sali* de *Aurala* ekde la 17:00.

Vi estas bonvenaj partopreni en ĉiuj niaj aranĝoj, sed bonvole informu pri via alveno speciale al jula festeto, kie ni regas kafon, teon kun julaj dolĉaĵoj por la partoprenantoj.

La horojn kaj tagojn vi trovas ankaŭ ĉe EST-eventokalendaro de la *Finna Babilejo* (*finnababilejo.fi*)

Bonvenon!

Turun Esperanto-yhdistyksen kurssit jatkuvat tiistaisin klo 16–19 Auralan kansalaisopistossa 2. joulukuuta asti. Viikkotapaamiset jatkuvat torstaisin klo 17–19 pääkirjaston kahvila Sirkuksessa 11. joulukuuta saakka.

Pikkujoulujuhlamme, se perinteinen, on torstaina 18. joulukuuta klo 17.00 alkaen Auralan Pohjola-salissa.

Ota siis yhteyttä, jos olet tulossa Turkuun. Ilmoittaudu erityisesti pikkujouluihin, jossa tarjoamme osallistujille kahvia, teetä ja jouluista syötävää.

Näet tiedot Finna Babilejon tapahtumakalenterista nimeltä EST-eventokalendaro, mutta varmista sen lisäksi myös sähköpostilla tai puhelimitse. Tervetuloa!

*Por EST-anoj, Tiina Oittinen
(kontaktoscioj p. 15, yhteystiedot s. 15)*

Fondumo Esperanto-säätiö (FES) julistaa haettavaksi apurahoja

Kokouksessaan 5.11.2025 Fondumo Esperanto-Säätiön hallitus julisti haettavaksi seuraavanlaisia apurahoja:

1. apurahoja Suomen Esperantoliiton (EAF) kesäkurssille osallistumiseen. Apurahaa voivat hakea kaikki alle 30-vuotiaat sekä kaikki kesäkurssille ensimmäistä kertaa osallistuvat,
2. apurahoja alle 30-vuotiaille nuorille ja esperanton opettajille osallistumiseen kansainväliseen esperantotapahtumiin,
3. apurahoja, jotka kattavat esperanton KER-tutkintojen (kielten eurooppalaisen viitekehysten mukaisten tutkintojen) tutkintomaksut.

Apurahoja haetaan ilman määräaikaa vapaamuotoisella hakemuksella, josta käy selvästi ilmi, että hakija täyttää haetun apurahan eh-

dot. KER-apurahoja voi kuitenkin hakea vasta sen jälkeen kun tutkintoon tai sen osaan (kirjalliseen tai suulliseen) on osallistuttu, jotta hakijan tulee ensin maksaa tutkintomaksu itse.

Hakemus (suomeksi, ruotsiksi tai esperantoksi) lähetetään Esperanto-säätiön hallituksen puheenjohtajalle Jukka Pietiläiselle, *jukka.pietilainen@gmail.com*. Häneltä voi myös kysyä lisätietoja. Lisätietoja Fondumo Esperanto-säätiöstä voit katsoa *www.esperanto.fi*-sivuilta, klikkaa kohta linkit.

*Jukka Pietiläinen
Prezidanto de Fondumo Esperanto
Fondumo Esperanto-säätiön hallituksen
puheenjohtaja*



Pri Aŭtunaj Tagoj en Tampere, Tampereen talvipäivistä 28.–29.9.2025

Aŭtunaj Tagoj en Tampere fine de septembro havis 28 partoprenantojn. La evento okazis en bonhumora kaj nostalgia atmosfero, eĉ ni povis ĝui pri la belega aŭtuna vetero. Laŭ la programo ni vizitis *Tampere-talo* (*Tampere-halo*), la kongresejon de la 80-a Universala Kongreso en 1995. Dum la rondirado tie nin gvidis oficisto *Mari Lehtovaara*. Alian rememoron de la UK 1995 ni salutis en la apuda parko *Sorsapuisto*, tie staras betulo nomita Esperanto-arbo. Pri pliaj aferoj dum la Tampere UK ni kune rememoris en Kulturdomo Laikku: tie EAF ankaŭ informis pri venontaj eventoj. Vespermanĝo okazis en loka restoracio. En dimanĉo ni piediris sub gvidado de *Jukka Laaksonen* en la antaŭaj industriaj kvartaloj de la urbo kaj vizitis la laboristan muzeon *Werstas*. Fermo de la Tagoj okazis lige al la tagmanĝo. Pli longa raporto kun multaj fotoj estis en Esperantolehti Suplemento 2025, kiu aperis en oktobro. Jen unu plia foto kun *Tuo-*

mo sur la verko *Blua linio* de artisto *Kimmo Kaivanto* en Tampere-talo. Dankon al ĉiuj kiuj ĉeestis en Tampere. Ĝis la revido en venontaj eventoj!

Tampereen talvipäivillä oli 28 osallistujaa. Tutustuimme ohjelman mukaisesti Tampere-taloon ja muistelimme muutenkin vuoden 1995 Esperanton maailmankongressia. Sunnuntaina teimme Jukka Laaksosen johdolla kävelykierroksen Tampereen keskustassa, tutustuimme entiseen tehdasmiljööseen ja vierailimme myös työväenmuseo Werstaassa. Kaunis sää suosi Tampereen syyspäiviä.

Esperantolehden v. 2025 lisäjulkaisussa on pitempi raportti ja useita kuvia. Tässä yksi lisää: Tuomo Sinisen suoran päällä.

Kiitos kaikille mukana olleille! Tervetuloa taas uudelleen tapahtumiimme!

raportis Tiina Oittinen

Lingva Angulo 1 de Jouko Lindstedt

Sola kaj nura

Por esprimi, ke ekzistas nur unu homo aŭ afero de iu speco kaj nenioj pliaj, oni plej ofte uzas la adjektivon *sola*, kiu do respondas al la finna ‘ainoa’: *tio estas la sola eblo daŭrigi* ‘se on ainoa mahdollisuus jatkaa’, *li estas mia sola vera amiko* ‘hän on ainoa todellinen ystäväni’.

De tempo al tempo oni tamen povas legi aŭ aŭdi, ke eĉ iuj spertaj esperantistoj uzas en ĉi tiu signifo la adjektivon *nura*, kio tamen estas eraro. Eble ĉe iuj lingvouzantoj influas la angla “only”, kiu signifas kaj *nur* kaj *sola*. Sed plej ofte temas certe pri tio, ke oni forgesis, kion *nura* propre signifas. Ĝustaj ekzemploj estas *la nura bleko de leono timigas* (nenio plia estas bezonata por timigi), *tio estas nura ŝerco* (kaj nenio pli grava). La finna ekvivalento de *nura* estas do ne ‘ainoa’, sed ‘pelkkä’: ‘se on pelkkää pilaa’. Por ĉi tiu signifo ne troviĝas alia vorto, sekve oni ne forŝtelu *nura* por alia uzo!

Sed ja eblas uzi la kunmetitan vorton *ununura* en la signifo ‘ainoa’: *li estas mia ununura vera amiko*. Ĝi estas nur iom pli emfaza ol *sola*.

La vorto *sola* havas tamen pli vastan uzon ol la finna ‘ainoa’, ĉar ĝi povas signifi ankaŭ, ke iu estas sen helpo, akompano aŭ amikoj, aŭ sentas sin tiel: *en la nova laborejo mi sentis min sola* ‘uudessa työpaikassa tunsin itseen yksinäiseksi’. La kanzonon *Sola* de la dana Esperanta muzikisto Kimo konas multaj. Aŭ la belajn versojn de *Kalevala*: *nordaj noktoj venas solaj, solaj plenlumiĝas tagoj, / ankaŭ sola li naskiĝis, prapoeto Väinämöinen* ‘yksin meillä yöt tulevat / yksin päivät valkeavat; / yksin syntyi Väinämöinen, / ilmestyi ikiru-

noja’. Rimarku, ke ne nur la finna adjektivo ‘yksinäinen’ sed ankaŭ la adverbo ‘yksin’ ofte tradukiĝas per la adjektivo *sola*: *ŝi sola riparis sian domon* ‘hän korjasi talonsa yksin’. La kaŭzo estas, ke la adverbo *sole* povas signifi ankaŭ proksimume la samon kiel *nur*, kaj tial *ŝi sole riparis sian domon* estus dubsenca: ĝi povus esti komprenata kiel *ŝi nur riparis sian domon* (kaj faris nenion plian).

Sed ĉu estas ĉiam facile distingi la du ĉefajn signifojn de *sola*? Ofte la uzo aŭ neuzo de la artikolo *la* povas signali la diferencon: *antaŭ la domo kreskis sola arbo* ‘talon edessä kasvoi yksinäinen puu’, sed *ĝi estis la sola arbo, kiun mi vidis* ‘se oli ainoa puu, jonka näin’. (Se ĉi tiuj frazoj aperus en la sama teksto unu post la alia, stile pli bele estus kompreneble skribi en la dua *la ununura arbo*.) Sed se mia frato sentas sin *sola* kaj malgaja, tio ne iĝas klara, se mi skribas *mia sola frato*. Tiam oni uzu adjektivon faritan el la substantivo *soleco*, do *soleca*: *mia soleca frato*. La vorto *soleca* ĉiam priskribas sentojn: *soleca homo* sentas mankon de kompanio, kaj *soleca arbo*, kvankam ĝi eble ne mem sentas sian solecon, elvokas en ni (aŭ almenaŭ en poeto) ian malgajan senton de izoliteco kaj aparteco.

Jouko Lindstedt,
membro de la Akademio de Esperanto en
la jaroj 1998–2025 kaj teamano de la nova
eldono de la Plena Ilustrita Vortaro,
regule skribos pri lingvaj temoj
en Esperantolehti.

Eblas proponi temojn – lia retadreso estas
jslindst@icloud.com.

Raita Pyhälä

Saliko, 20.11.1939–20.8.2025



Rememoroj pri Saliko, Muisteluja Raidasta

La forpaso de *Raita Pyhälä*, kiun oni en Esperantaj rondoj plej bone konis per la nomo *Saliko*, estas granda funebro kaj perdo ne nur al la finnlanda esperantujo. *Raita* esperantiĝis en la 1990-jaroj kaj komencis baldaŭ uzi sian esperantigitan nomon *Saliko*. En la jaro 1995 ŝi prelegis kaj instruis dum la sesio *finna eksprese* en la Universala Kongreso de Tampere. Ŝi estis ankaŭ kontribuanto de la gazeto *Monato*, pri kio ŝi mem skribis mallonge en *Esperantolehti* 3/2024. Saliko estis aktiva en ĉiuj aferoj, kiujn ŝi partoprenis: kiel membro de la redakta grupo kaj ankaŭ aktiva skribanto por *Esperantolehti*, kiel vicestrarano de EAF dum la jaroj 1995–1997, kiel prezidanto de ELFI, kiel kunlaboranto en UK-oj kaj en



Foto: KL.

Tampere kaj en Lahti kaj tiel plu: oni povus fari longegan liston.

Saliko estis vaste konata en la Esperanta mondo kaj informo pri ŝia forpaso rapide atingis la esperantlingvajn komunikilojn. Almenaŭ la gazetoj *La Ondo de Esperanto*, *Juna Amiko* kaj *IPR* publikigis memorojn pri ŝi same kiel la reta servo *edukado.net*. Ĉiuj esperantistoj kaj en Finnlando kaj alie en la mondo varme memoras nian karan Salikon. La parencoj de Raita aranĝas por ŝi memor-eventon la 23-an de novembro en Helsinko, en kiu ankaŭ kelkaj finnlandaj esperantistoj partoprenas.

Por la estraro de EAF, Tiina Oittinen



Jen memoroj de Sylvia Hämäläinen pri la aktiva agado de Raita Pyhälä en ELFI (Esperanto-Ligo de Finnlandaj Instruistoj):

Rememoroj pri Saliko

ELFI, Esperanto- Ligo de Finnlandaj Instruistoj, konektis Salikon kaj min. Saliko estis elektita ĝia prezidanto en 1995 kaj ŝi aktivis en tiu posteno ĝis 2000. Mi estis tiam ĝia sekretario. Kiel estrarano de ELFI ŝi estis 2010–2020.

Saliko ofte partoprenis Universalajn kongresojn kaj ILEI-konferencojn (nuntempe tiuj nomiĝas ILEI-kongresoj). Ofte ni estis kunloĝantoj. Ambaŭ ni elektis proprajn programojn dum la okazoj, do ni ne dependis unu de la alia. Tiu aranĝado konvenis al

ni ambaŭ. Pere de retmesaĝoj ni hejmlande kontaktiĝis.

Saliko havis brilan talenton skribi eseojn kaj fari tradukojn. Tion ŝi pli volonte faris ol instruis, ĉar ŝia aŭdkapablo iom post iom malfortiĝis. Saliko estis kunlaboranto ekzemple de Juna Amiko kaj en preskaŭ ĉiu ĝia numero ni povis ĝui ŝiajn verkojn. Ŝi prezentis ekz. finnajn kutimojn, manĝaĵojn kaj gravajn librojn. Ŝiaj eseoj estis publikigitaj en almenaŭ Juna Amiko, Monato, La Ondo de Esperanto kaj Esperantolehti. Ŝi krome partoprenis en skribkonkursoj kaj almenaŭ en tiu nomita *Esperanto ligas homojn*, aranĝita de La Ondo de Esperanto, ŝi gajnis diplomon per la titolo *Longa vojo al mondcivitaneco*.

Saliko ankaŭ prelegis pri diversaj temoj precipe en BET, Baltiaj Esperanto-Tagoj. Dum la

UK en 1995 ŝi prezentis la lokan, finnan, lingvon dum la tradicia programero *finna eksprese*, trifoje 1,5 horojn kaj rakontis pri la *Muminfenomeno* en la libroservo. Post la UK ŝi estris la konferencon de ILEI en *Övik* proksime al *Porvoo*. Samtempe kun la UK en Lahti 2019 okazis *IKBE, Internacia Kongreso de Blindaj Esperantistoj*. En ĝi Saliko havis gravan taskon prelegante, interpretante kaj helpante gvidi la viddifektitojn.

La japana legprojekto *Esperanta Sumoo* estis en Finnlando prezentata kaj proponolata ĝuste de Saliko. Ŝi aranĝis plurajn ekspoziciojn en la biblioteko de *Hyvinkää*.

La finnlanda esperantujo perdis grandan talentulon. Saliko mankas al ni.

Sylvia Hämäläinen



Saliko ofte vizitis ankaŭ ĉe Esperantofratinoj en Hämeenlinna (legu kion ŝi mem skribis pri la fratinoj-grupeto en Esperantolehti 2/2024 p. 10). Jen iliaj memoroj finnlingve:

Salikon muistolle

Raita Pyhälä on kuollut! Tieto saavutti meidät, Hämeenlinnan esperantisaret, kesän vihreydessä. Ennen juhannusta olimme viettäneet yhden sisaremmen syntymäpäivää yhdessä Hämeenlinnassa – nyt suru oli suuri!

Tutustuin Raitaan (Salikoon), kun hän oli opettajana Esperanton peruskursilla Jyväskylässä heinäkuussa 1997. Hän avasi silloin oven esperantomailmaan, joka toi mukanaan paljon ystäviä sekä uusia kokemuksia koti- ja ulkomailla. Raita oli taitava jakamaan tietoa Esperantosta kouluissa ja kirjastoissa. Hän antoi neuvoja valmistellessamme Esperantonäyttelyitä Hämeenlinnassa, Janakkalassa, Padasjoella. Raidan vierailut Hämeenlinnassa ja osallistuminen kokouksiimme oli hyvin mieluista.

Esperanton lisäksi meitä yhdisti Raitaan myös historia, kulttuuri, taide ja luonto kasveineen. Meillä oli onni vierailla Raidan kesäkodissa Horslökissä. Muistoihin jää kävely ympäristössä ja ihanat merimaisemat, monet keskustelut. Kesäisin oli perinteenä tehdä vierailuja nähtävyyksiin. Mukava muisto on laivaretki ennen juhannusta Petäykseen lounaalle sekä tutustuminen Hattulan Vanhaan kirkkoon ja Visavuoreen.

Raita, rakas Saliko, kiitos ystävyystäsi – hyvää taivasmatkaa!

*Hämeenlinnan Esperantisaret –
Esperantofratinoj el Hämeenlinna
Kati Lindell*

Primemoro de Saliko per ŝia propra teksto

Ĝi aperis nedatita en la retejo *verkoj.com* inter 14 tekstoj, eseoj, rakontoj, fabeloj k.a. – vidu! Tio estas nur parto de la ampleksa verkado de Saliko. Karakterizas ŝin kvazaŭ memportreto.

Mi petis de la filino *Kaisa Pyhälä* permeson aperigi la poemon kun mia traduko, kion ŝi volonte donis. Jen ligilo kiel vi trovos la tekston
<https://verkoj.com/verkistoj/raita-pyhala/> kiel omaĝon al nia elstara esperanto-verkisto.

Tuomo Grundström

Saliko: La ĉambroj de la vivo

Poemo dediĉita al forpasinta amiko

En la koridoro de la vivo
malfermiĝas, fermiĝas pordoj.
Kuraĝe enrigardu ĉiun ĉambron!
Antaŭ enigma malhela pordo
mi longe staris sen ŝlosilo, konsternita.
Ion mi aŭdis de interne, sed kion?
Venis maljunulo iom kripla,
li nenion postulis aŭ demandis.
En siaj sulkaj manoj li portis teneron,
en sia buŝo komprenemon kaj saĝon.
Kaj tio estis la ŝlosilo!
Kia surprizo!
La ĉambron lumigis amo, puro, ĝojo.
Tie ludadis Esperante gejunuloj
maskitaj maljunece kiel li kaj mi.
Provu ĉiujn ĉambrojn! Ili malfermiĝos.
Ĉiuj ĉambroj ankaŭ fermiĝos,
unu post la alia.
Sed memoroj restos
ĝis la lasta pordo.
Kaj ĉu transe?

Raita Pyhälä: Elämän huoneet

Omistettu edesmenneelle ystävälle

*Elämän käytävällä
aukeaa ja sulkeutuu ovia
Katso arkailematta joka huoneeseen!
Oudon tumman oven edessä
seisoin kauan avaimetta, neuvottomana.
Jotain kuulin sieltä, vaan mitä?
Tuli vanhus vähän ontuen
mitään vaatimatta tai kysymättä.
Uurteisissa käsissään hän kantoi hellyyttä,
suussaan ymmärrystä ja viisautta.
Ja siinä se avain!
Mikä yllätys!
Huonetta valaisi rakkaus, puhtaus, ilo.
Siellä kisailivat esperantonuoret
vanhusnaamioissa kuten hän ja minä.
Käy kaikkiin huoneisiin! Ne avautuvat.
Kaikki huoneet myös sulkeutuvat
yksi toisensa jälkeen.
Mutta muistot jäävät
viimeiselle ovelle asti.
Entä jälkeen?*

(Suom. TG 23.10.2025)



Suomen Esperantoliiton ja jäsenjärjestöjen yhteystiedot

Esperanto-Asocio de Finnlando,
Suomen Esperantoliitto ry
Esperantoförbundet i Finland
Fondita/Perustettu/Grundad: 1907

Prezidanto/Puheenjohtaja/Ordförande:

Juha Metsäkallas, Turku

✉ eafprezidanto@esperanto.fi

Vicprezidanto/Varapuheenjohtaja/

Vice ordförande: *Paula Niinikorpi, Pori*

✉ paula.niinikorpi@gmail.com

Sekretario/Sihteerii/Sekreterare:

Tiina Oittinen, Turku

☎ 050 549 4709, ✉ eafsekretario@esperanto.fi

Kasisto/Rahastonhoitaja/Kassör:

Tiina Kosunen, Espoo ✉ eafkasisto@esperanto.fi

Pankkitili/Bankkonto (de EAF): FI82 5721

1520 2859 38 (notu: pagoj al UEA, vidu sube)

Aliaj estraranoj / Hallituksen muut jäsenet /

Övriga styrelsemedlemmar:

Tuomo Grundström, Rauma, ☎ 0440 199 766,

tuomo.grundstrom@gmail.com

Arja Kuhanen, Tammela,

✉ kuhanenarja@gmail.com

Päivi Saarinen, Helsinki, ☎ 050 490 0154,

✉ paivi.saarinen@iki.fi

Vicestraranoj/Varajäsenet/Suppleanter:

Leila Tiitto, Oulu, ✉ leila.a.tiitto@gmail.com

Robert Bogenschneider, Pori,

✉ brilanto@gmail.com

Jukka Laaksonen, Tampere,

✉ jvaletto@kolumbus.fi

Maksut UEA:lle, yhteyshenkilö/ Peranto de

UEA ktp / Betalningar till UEA:

FI57 1815 2913 6360 14, NDEAFIHH

Peranto de UEA/yhteyshenkilö:

Tiina Kosunen ☎ 044 576 3314

✉ cefdelegito@esperanto.fi

Suomen Esperantoliiton jäsenyhdistykset

Helsingin Esperantoseura /

Esperanto-klubo de Helsinki

www.esperanto.fi Jäsenyhdistykset Helsinki

esperantohelsinki.wordpress.com

✉ esperanto@bastu.net

Oulun Esperantoseura /

Esperanto-societo en Oulu

www.esperanto.fi Jäsenyhdistykset Oulu

Aini Vääräniemi, Vääräjärventie 26 B,

93590 Vanhala

✉ aini.esperanto@gmail.com

Esperantoseura Antaäen r.y. /

Esperantosocieto Antaäen, Tampere

www.esperanto.fi Jäsenyhdistykset Tampere

✉ raimo.tuisku@saunalahti.fi, ☎ 050 411 5177

Turun Esperanto-yhdistys ry. /

Esperanto-Societo en Turku

www.esperanto.fi Jäsenyhdistykset Turku

✉ tiina.oittinen@pp.inet.fi, ☎ 050 549 4709

Suomen nuorten Esperantoliitto / Finnlanda

Esperantista Junulara Organizo (FEJO)

www.esperanto.fi Jäsenyhdistykset FEJO

✉ fejo@esperanto.fi

Iisalmen ja Ylä-Savon esperanton harrastajien

yhteyshenkilö: Onni Kauppinen, Lapinlahti.

✉ onni.kauppinen@gmail.com,

☎ 0500 813 530.

Esperanton harrastajia on edellä mainittujen

paikkakuntien lisäksi myös mm. Hämeenlin-

nassa, Hyvinkäällä, Jyväskylässä, Lahdessa,

Maarianhaminassa, Porissa, Raumalla, Salossa ja

Taivalkoskella. Paikkakuntien yhteyshenkilöistä

saa tietoa liiton hallituksen jäseniltä.

Jäsenyhdistysten jäsenet ovat automaattisesti myös Suomen Esperantoliiton jäseniä. Kullakin jäsenyhdistyksellä on oma jäsenmaksu. Jos paikkakunnallasi ei ole jäsenyhdistystä, voit myös liittyä liiton henkilöjäseneksi. Lisätietoja jäsenyhdistyksiltä ja liiton toimihenkilöiltä.

Filmo Patrinoj – Āidit premieris en UK kaj en Helsinki

La Esperant-lingva kurtfilmo *Patrinoj – Āidit* de la finna reĝisoro *Anna Andersson* havis sian mondan premieron la 29-an de julio 2025 en la 110-a Universala Kongreso de Esperanto en Burno (Brno), Ĉeĥio. Pri ĝi aperis raporto de *Jouko Lindstedt* en *Esperantolehti Suplemento 2025*.

Por la membroj de Esperanto-Asocio de Finnlando okazis prezentado en *Helsinki*, la 18-an de oktobro 2025. Kiel kinejo en Helsinki servis teatro *Narrin näyttämö* en la urboparto *Sörnäinen*. Ĉeestis ĉ. 15 EAF-membroj kaj sama nombro de la filmoteamo, inter ili kaj la reĝisoro kaj la tri ĉefrolulinoj. Post la prezentado de la 30-minuta filmo okazis en la kinejo vigla diskuto kun demandoj kaj respondoj. Kaj ni ricevis interesan novaĵon: Anna Andersson kun la filmoteamo planas normallongan filmon pri la sama temo, la plej unuaj agoj por realigi ĝin estas jam faritaj. EAF deziras sukceson al la projekto kaj subtenos ĝin laŭeble.

Informe, ke en decembro eblos al EAF-membroj spekti la filmon distance. Pliajn informojn vi ricevos retroŝte.

Elkoran dankon al Anna kun la tuta filmoteamo pro la aranĝita prezentado en Hel-



Aktoroj de la filmo Patrinoj - Āidit, de maldekstre: Anastasia Trizna (Niiĵa), Tuomas Kiiliäinen (Leo), Inkeri Hyvönen (Ella), Ilkka Olavi (Max) kaj Johanna Kuuva (Āva). Fotis Arja Autio el la filmoteamo. La foto aperis jam en *Esperantolehti 5/2024*.

sinki! Temas pri kortuŝa filmo, kies rakonto bedaŭrinde estas tro aktuala en multaj landoj de nia vasta mondo.

raportis Tiina Oittinen

Seuraava numero ♦ Venonta numero

Seuraava numero ilmestyy helmikuussa. Aineisto 31.1.2026 mennessä toimitukseen.

La venonta numero aperos en februaro. Artikoloj ĝis 31.1.2026 al la redakcio.

Osoite/adreso: Esperantolehti/EAF, s-posti/rete: eaf@esperanto.fi.